# KATOLIKA MONDO

**Universala Organo por tutmondaj interesoj katolikaj**

Oficiala internacia organo de „Internacio katolika“ (Ika), de „Mondjunularo Katolika“ (Moka), de „Internacia katolika Unuiĝo Esperantista“ (I. K. U. E.) kaj de „Blanka kruco“ (Internacia misio katolika)

Numero 2. 1921 | I. Jarkolekto 1921/22


# La internaciaj katolikaj konferencoj en Graz.

Estas la belaj kaj varmegaj tagoj de Aŭgusto, la monato de la libertempoj kaj kongresoj. Tra la homaro ĉiam maltrankvila depost la milito tutmonda, kuras malĝojigaj famoj pri mizero kaj malsato, pri revoltoj kaj sangaj konfliktoj. El la malproksima Rusa oriento eksonas la kordisŝirantaj helpkrioj de la bolŝevista registaro. La kruela malsato trapaŝas vastajn regionojn de la malfeliĉa lando mortigante mil kaj mil da mizeregaj homoj, da senkulpaj infanetoj kaj la tifo kaj la ĥolero dezertigas urbojn kaj vilaĝojn. El aliaj partoj de la mondo oni aŭdas pri danĝeregaj konfliktoj. En Supra Silezio, kies terura sorto fine devus esti decidata dum tiuj tagoj, kruela militeto; en la malproksima Azio komenco de novaj interbataladoj, sangaj konfliktoj en Irlando, longdaŭraj strikoj kaj ekonomiaj krizoj ... Ĉie la malamo kaj la malpaco en la mondo sen Kristo, sen leĝo, sen karito!

Dum tiuj-ĉi tagoj, plenaj de mizero kaj malamo, meze de la ĝenerala maltrankvileco internacia, en nia belega konferencurbo, en Graz, kunvenis katolikaj fratoj el la plej diversaj landoj de la mondo, entuziasme brulantaj de vere Krista amo kaj fervore decidemaj al energia repaciga laboro internacia. El 19 diversaj ŝtatoj ili estis kunvenintaj por pritrakti fratamaniere la plej gravajn problemojn de la katolika agado nuntempa: la internacia kunligiĝo de la katolikoj diversnaciaj por realigi vere agadkapablan internacian helporganizon kun vere praktikaj laborinstitucioj. Vere frata unueco, vere kortuŝanta laborfervoro, vere mondpentekosta spirito. Al ĉiuj partoprenintoj la belegaj Grazaj tagoj, riĉaj de bonfruktaj laboroj kaj utilegaj spertoj, restos certe neforgeseblaj. Malgraŭ multegaj malfaĉilaĵoj plej diversspecaj, la sukceso estis surprize bona. Dio estis kun ni. Al li estu la plej profunda danko!

## Saluta vespero.

Estas je la 8a vespere. La feste dekorata „Leosalonego“ brilas pro lumo, tremas pri ĝoja espero. Meze de multkoloraj floroj kaj verdaj girlandoj staras la impona bildo de Lia Papa Moŝto Benedikto XV., nia komuna patro en nia internacia familia rondo, la anstataŭanto de la Dia Majstro Jesuo Kristo, en kies nomo oni komencas la belan kaj signifan taskon.

Nome de la loka organiza komitato unue Dro M. J. Metzger salutas la karajn gastojn, kiuj estis alvenintaj el preskaŭ ĉiuj Eŭropaj landoj kaj ĝojege, preĝante eksonis tiel belega kanto interfratiĝa:

> Ho venu vi Di' Paraklit'
> Ho ven' kun fajraj flamoj!
> Ekfajru nin, konsumu nin
> Brulant' de Diaj amoj!
> La filojn de ni' mondfratar'
> Infanojn de la amo far'!

La impresa kanto kreis vere mondpentekostan spiriton, kiu admirindege daŭris dum ĉiuj pritraktoj. Post la elekto de la prezidantaro por la sekvontaj konferencoj, Sro P. Heilker, Nederlando, kune kun Dro Arendzen, Londono, kaj Pro Dro Carolfi, Italujo, elektita kiel prezidanto de la saluta kunveno, kun entuziasma aplaŭdo ĝenerala proponis sendi saluttelegramon al Lia Papa Moŝto.

Tuj post la fino de la konferencoj alvenis danktelegramo de la Sankta Patro, sendita al lia princepiskopa Moŝto de Graz, per kiu la Sankta Patro dankas al la partoprenantoj kaj donas la elpetitan apostolan benon.

Tiam Sro Heilker en fajra saluta parolado skizis la grandegan signifon de la nunjara kunveno, kies karakteruma vorto estu: praktika laboro. Kaj nun venis vere impresa bildo. La reprezentantoj el 19 diversaj ŝtatoj alportis la salutojn de la katolika samideanaro de la rilataj landoj, parolante ĉiam komence en sia gepatra lingvo kaj tiam en Esperanto, vere efika pruvo por la neceso de unueca helplingvo por la neesperantista ĉeestantaro, el kiu multaj decidis tuj lerni Esperanton, vidinte ĝian admirindan signifon praktikan. En la nombro de la salutantoj i. a. troviĝas: Sro Dro Arendzen, Londono, Sro P. Muffang, Francujo, Sro M. Mielert, Germanujo, Prof. Arnold, Svisujo, Pro Dro Carolfi, Italujo, Sro deputato Tiunjaitis, Litovujo, plue reprezentantoj el Nederlando, Belgujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Polujo, Rumanujo, Ĉeĥoslovakujo, Saar-teritorio, Danzig, Alĝerujo ktp. Sekvis la laŭtlegado de multnombraj saluttelegramoj kaj leteroj el la plej diversaj partoj de la mondo. Multaj episkopoj el diversaj landoj, ekz. Hispanujo, Francujo, Italujo, Hungarujo, Rumanujo ktp. estis sendintaj sian benon por la sukceso de la internacia kunveno.

Precipe rimarkinda estas la granda intereso de la politikaj partioj katolikaj je nia movado internacia. Inter aliaj Sro Don Sturzo, politika sekretario de la „partito popolari“, Romo, sendis koregan telegramon en la nomo de sia grandega partio, bedaŭrante, ke li ne povas persone ĉeesti; same Sro Marc Sangnier, deputato de Parizo, kiu same ne povis persone veni, sendis tre afablan saluton. En la nomo de la „Centrum“, katolika partio de Germanujo Sro Dro Müller, Marburg, ĝojege salutis la konferencantojn, plue la katolikaj partioj de Litovujo kaj Slovakujo estis reprezentataj.

Fine granda nombro de salutskribaĵoj estis alveninta ne nur el ĉiuj Eŭropaj landoj, sed preskaŭ el ĉiuj partoj de l' mondo, el Latvio, Palestino, Suda Afriko, Usono, Suda Ameriko, Filipinaj insuloj, Brita okzidenta Hindujo ktp., vere granda familia rondo tutmonda, unuigita per la amo, preĝo kaj beno de Dio.

Post kelkaj ĉarmaj kantoj la lastaj strofoj de la himno finis la belan kunvenon:

> Ho venu vi Di' Paraklit'
> Ho send' la sep donacojn!
> Ekaŭdu nin, ĝojigu nin,
> Ho don' la Diajn gracojn!
> La filojn de ni' mondfratar'
> Infanojn de la ĝojo far'!

## Ika-konferenco.

11a de Aŭgusto. Post la solena diservo komencas sub la prezido de Sro Dro Carolfi, Italujo, kaj Sro Mielert, Germanujo, la ĉefa konferenco pri la internacia kunlaborado katolika kaj la perfektiĝo de granda internacia helporganizacio. Tuj je la komenco okazis tre interesa diskuto mallonga pri la lingva problemo. Ĉar estis kelkaj, kiuj postulis, ke Esperanto estu la sola lingvo uzata dum la kunvenoj publikaj. Sed el la plej diversaj kialoj tio ne ŝajnis praktika kaj utila al Ika kaj oni fine interkonsentis, ke ĉiu ĉeestanto parolu laŭeble en Esperanto, sed se tio ne estas eble, estu permesate, ke li paroladu en unu de la ĉefaj lingvoj. La raportojn faritajn en Esperanto oni resume traduku en la ĉefajn lingvojn laŭ deziro de la ĉeestantaro, same la en naciaj lingvoj faritaj paroladoj estu resume repetitaj en Esperanto. Jen, tre grava

## LA PATRO.

De Leonhard Frank, esp. W. K. 2

Ankaŭ Roberto silentis, faris la laboron, kiun oni donis al li. Kaj ĉar li diversfoje lasis forkuri gastojn, kiuj ne estis pagintaj, oni nur volis uzi lin kiel akvoportanton en la hotelkafejo. Li sin deklaris preta ankaŭ por tio.

Roberto sciis, ke io okazos. Tial li plue montris tiun ĉi danĝeran trankvilon. Ĉar kiel povis esti eble, ke nenio okazis per li, kiu ne plu povis perdi ion, ĉar li jam ĉion estis perdinta? Li, kiu estis kovrata per maldika kelnerhaŭto, sub kiu la homo kriis, kriis terure mute la doloro, la amo? Pro malgrava kaŭzo la haŭto povis krevi. Tiam la krio suprenvenis.

La infanpafiletojn kaj sabretojn li forportis el siaj okuloj en la hotelon kaj kaŝis ilin malantaŭ la piano. Ĉar kiam li nur rigardis tiun ĉi ludilaron, la kulpo bruligis lin. Sed kiam li servis leŭtenanton ornamitan per militordeno, liaj manoj ne tremis.

Kaj iun tagon, kiam patriota unuiĝo de junuloj — duonkreskintaj knaboj kun pafiloj — marŝis en la strato preter la hotelo kaj kantis „Ne povas mi doni la manon al vi, ĵus ŝarĝante . . .“, la kulpkonscio sin boris ardante en Roberton. Ĉar ankaŭ li estis lerniginta kaj instruiginta al sia filo tiajn kantojn kaj aŭskultinta lin kun patra fiero.

En sovaĝa streĉeco li staris sub la hotelpordego kaj sentis, ke sia salto al la pretermarŝantaj, malbone instruitaj junuloj estus salto en la aeron. Ĉar malantaŭ la junuloj kaj malantaŭ la batalkanto staris io, kio ne estis kaptebla: nevidebla, senkorpa kontraŭulo. Dio lin retenis de la salto. Roberto sentis, ke Dio lin rezervis por la minuto, kiam la malamiko fariĝos kaptebla.

Kaj iun tagon li ekkonis tiel precize la malamikojn kiu estas en la homo mem kaj ne ekster li, ke liaj okuloj fariĝis tiuj de kulpkonscia mortiganto. Okazis, ke larmoj de sovaĝa kolero venis malantaŭ liaj okuloj, kiam li vidis knabinojn, kiuj sian fianĉon, edzinon, kiuj sian edzon, gepatrojn, kiuj sian filon estis perdintaj kaj kiuj tamen povis rideti kaj mendi kiel ĉiam la glason da biero.

Patrino, kies helpanto por la maljuneco, kies espero, kies centra punkto de l' amo — kies sola filo estis frakasita sur la kampo de l'honoro, diris al Roberto: „nun oni devas kontentiĝi kun la sorto.“ La kolon de tiu ĉi patrino li sovaĝe ekkaptis. Dio karesis la manojn de la kelnero kaj metis liajn pro amo tremantajn fingrojn dolĉmaniere sur la ŝultrojn de la patrino. Ĉar ne la virino estis kulpa, ne ŝi estis la malamiko kaj ne ŝiaj vortoj, sed tio kio staris malantaŭ la vortoj. Kaj tio estis io neekzistanta. Estis la neekzistado de l'amo.

La memmortiga kulpkonscio forbruligis la malgrandan patran amon, tiel ke la prasento de la granda amo povis ekiĝi en li.

En plej profunda humileco, en kies centro staris la nevenkebla forto de l' amo, li plenumis la laboron de la kelnerknabo, alportis akvon al la gastoj, purigis glasojn kaj iris, kiam la sonorilo lin vokis, en la grandan hotelĉambregon.

Seruristoj, masonistoj, lignaĵistoj, ladistoj, tapetistoj, vitristoj, pro laboro eluzitaj viroj, kiuj similis al haraj, terure malbelaj bestoj kun homaj okuloj, plenigis la grandan hotelĉambregon: la unuiĝo de la konstrulaboristoj faris sian jarkunvenon.

Roberto alportis al la parolanto, kiu staris sur la podio, botelon da akvo kaj apogiĝinte al la piano, malantaŭ kiu troviĝis la sabretoj kaj pafiletoj, li aŭskultis la parolanton.

Tiu ĉi deklaris, ke tiun ĉi jaron subvencioj ne povas esti pagataj al membroj malsanaj kaj sen laboro. Ĉar preskaŭ neniuj kotizaĵoj estas enkasigitaj. Krom tio oni sendis daŭran subvencion al la membroj en la militejo — kaj tiujn oni preferis al ĉiuj aliaj. „La rezervaĵoj estas konsumitaj. La kaso estas malplena.“ Nun estas la demando, ĉu la membroj, kiuj estas ankoraŭ sanaj kaj perlaboras, volos pagi pli ol sia kotizaĵo por la membroj malsanaj kaj sen laboro. Se ne, nur restos, disigi la de kvindek jaroj ekzistintan unuiĝon de konstrulaboristoj kaj likvidi la subvencikason por la malsanuloj. „Ni devas kvazaŭ anonci la bankroton.“

Sepcent okulparoj de sepcent konsternite silentaj homoj rigardis sendecide la parolanton. La virinoj, kies kuirpotoj estis malplenaj, kaj la virinoj, kies edzoj estis en la militejo aŭ estis jam mortfalintaj, estis ricevintaj ruĝmakulajn vangojn. La fera plataĵo, kiu de du jaroj kuŝis sur tuta Eŭropo, kuŝis videble ankaŭ sur tiuj ĉi sepcent homoj, ŝarĝitaj kiel bestoj per sufero kaj mizero.

Malgranda knabo eltiris la infanpafilon malantaŭ la piano, kiu staris sur la podio, kaj celis, la fuston ĉe la griza vango, malsupren al la sepcent senmovaj viroj kaj virinoj. Ĉiuj rigardis la truon de la tubo el blanklado. Kaj ekstere staris, la pafilfuston ĉe la vango, en kulpo kaj peko milionoj da homoj kontraŭ milionoj da homoj, kiuj ankaŭ staris en kulpo kaj peko.

Jen Roberto faris la salton. Estis tute malrapida salto. Li iris certe kiel somnambulo al la knabo, forprenis la ludilon de lia vango kaj antaŭeniris ĝis la rando de la podio.

(Daŭrigota.)

decido, kiu sendube havas la plej grandan signifon por la estonto de niaj Ika-kongresoj. Ĉar fine oni unuanime interkonsentis, ke Esperanto nur estu ilo, sendube tre taŭga kaj necesa, sed oni ne devas altrudi al ne-Esperantistoj la helplingvon, sed per praktika ekzemplo instrui ilin. La sukceso konfirmis tion. Ĉiuj ĉeestantoj, ankaŭ kiuj estis venintaj kiel kontraŭuloj de helpa lingvo, jam dum la konferencoj komencis lerni Esperanton.

Post ĉi-tiu grava decido Sro Dro Metzger, anstataŭante nian altestimatan Ika-prezidanton Pro A. L. Poell, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti, skizis en grandaj trajtoj la hodiaŭan situacion tutmondan de de la katolika eklezio. — Kiel mezurilon por la prijuĝo li metis la demandon, kiome kaj kiamaniere la eklezio interne kaj eksteren ĝis nun sukcesis plenumi sian Dian mision: efektivigi la regnon de Dio inter ĉiuj homoj de la tuta mondo. Kaj li montris nun unuflanke la grandegajn perdojn de l' eklezio dum la lastpasintaj centjaroj per la reformacio, deismo, materialismo socialista ktp., precipe inter la intelektularo kaj laboristaro, aliflanke la admirindegajn sukcesojn: eksteren la grandioza disvastigo de l' eklezio en la ĝis nun idolanaj landoj, interne la sukcesplenaj renovigaj movadoj precipe dum la lastaj papoj, kiam la eklezio fakte estiĝis la plej influa morala potenco de l' mondo. Fine li klarigis la grandajn kaj gravajn taskojn, kies solvo estas rezervata al la nuntempa katolikaro. El la diversaj ĉefaj problemoj, kiuj hodiaŭ fakte iĝis internaciaj, li menciis i. a. le regajnadon de la laboristaro kaj intektularo por Kristo, la rilatoj inter la eklezio kaj la moderna ŝtato; la konservado de la kristanaj lernejoj, la eklezio kaj la problemo de la kapitalismo, de l' socialismo, de la Macchiavellismo ktp. Post tiu-ĉi skizo, donanta la ĝeneralan kadron, la reprezentantoj de la diversaj ŝtatoj raportis mallonge pri la nuna situacio de l' eklezio en siaj ŝtatoj. Estis vere imponа bildo de la „batalanta eklezio". Tutklare oni vidis la admirindajn klopodojn de la katolikaro por solvi la taskojn de l' moderna tempo; oni aŭdis pri la plej interesaj solvoprovoj, pri malfacilaĵoj, sukcesoj, malsukcesoj, imitindaĵoj ktp.

La saman tagon, posttagmeze daŭrigo de l'Ika-konferenco. Sekvis detala raporto de Sro Dro Metzger pri la realigo de la internacia katolika helporganizo. Jen la ĉefaj tezoj de la tre interesa kaj klariga parolado:

1. La alta celo de l' sankta Eklezio estas la realigo de l' regno de Kristo en la mondo, la trapenetrigo de la tuta homara kulturo per la principoj de l' vivanta kristaneco.

2. Por atingi ĉi tiun celon la Eklezio tra ĉiuj jarcentoj kreskigis helporganizojn ĉiuspecajn, kiuj pro la klopodoj sukcesintaj de la kontraŭekleziuloj hodiaŭ pli ol iam estas necesaj por la fina venko de Kristo en la mondo.

3. Pro la internacia kunlaborado de la kontraŭkreduloj, pro la grandaj internaciaj taskoj de l' Eklezio en la nuna mondo ni bezonegas hodiaŭ internacian katolikan helporganizacion.

4. La celo de ĝi estu:

*a)* edukado de la katolikoj al la spirito de supernacia unueco vere katolika;

*b)* organizo de helpservoj ĉiuspecaj inter la katolikoj ĉiulandaj;

*c)* organizo de internacia kunlaborado de la katolikoj sur ĉiuj agadkampoj ĉu religia, ĉu socia, ĉu kultura, ĉu karita ktp.;

*d)* organizo de diversspecaj internaciaj institucioj katolikaj.

5. La formo de l' organizo internacia devas korespondi al la diversaj taskoj, do samtempe ebligi la aliĝon de individuaj kunlaborantoj kiel precipe la kunagadon de la grandaj katolikaj organizaĵoj naciaj.

6. La internacio katolika estu precipe ne direktanta sed al ĉiuj organizaĵoj kaj movadoj servanta organizacio, do neŭtrala rilate de la nacia politiko kaj la diversaj direktoj inter la katolikoj.

7. Precipaj institucioj estu internacia oficejo por informoj kaj helpservoj ĉiuspecaj, internacia libroeldonejo, internacia gazeto katolika.

8. La alcelita internacio katolika kiel ligo de ĉiuj organizitaj katolikaj fortoj kaj movadoj estos sekvo de longjara evoluo, ĝi supozas la kunlaboradon de ĉiuj bonvoluloj katolikaj en kiel eble plej elasta organizacio.

Dum la sekvantaj tagoj okazis diversaj kunsidoj de la direktoraro por detale pripensi la ĉefajn aferojn de Ika, la organizan formon, la financan problemon, la gazeton oficialan ktp.

Sabate la 13an de aŭgusto fina kunsido de l' Ika-konferenco kaj poste ĝenerala kunveno de Ika. Komencis la kunsido kun detala diskutado pri la diversaj demandoj, precipe pri Ika kaj IKUE, Ika kaj la episkoparo, pri la oficiala organo ktp. En ĉi tiu okazo oni konstatis, ke kompreneble diversaj episkopoj estas atendemaj, ĉar ili ja prave volas vidi, ĉu Ika taŭgas kaj povas montri praktikajn sukcesojn. Do la praktika laboro estas la plej taŭga ilo por akiri la tutan episkoparon de l' mondo. Tamen jam pli ol 25 ekleziaj princoj el 12 diversaj ŝtatoj, inter ili kardinaloj, ĉefepiskopoj, apostolaj nuncioj, entuziasme salutis kaj donis bonvole benon kaj subtenon. Pri la organo oni preskaŭ unuanime interkonsentis, ke Katolika Mondo pligrandigota estonte estas la plej taŭga organo por la interesoj de Ika. Oni finis la diskutadon post aprobo de la supre skribitaj 8 tezoj de Dro Metzger per unuanima akcepto entuziasma de jena resolucio:

La partoprenantoj de la internaciaj katolikaj konferencoj en Graz:

Konvinkitaj, ke la hodiaŭa situacio de la katolikaro tutmonda pli ol iam bezonas internacian kunlaboradon de ĉiuj fortoj katolikaj kontraŭ la internacie unuigitaj fortoj de la nekrista homarismo, framasonoj, materialismo socialista, nekredemaj, eĉ kontraŭkristanaj scienco, literaturo, gazetaro, politiko ktp., por la realigo de la regno de l' Dia Savinto en la mondo;

konvinkitaj, ke ĉi tiu kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj ne estas alia ol la natura sekvo de la ordono de la Dia Majstro pri kristana karito kaj misiomandato;

konvinkitaj, ke ĉi tiu kunlaborado postulas la kreon de vere efika agadema helporganizo katolika internacia;

konvinkitaj fine, ke la organizata kunlaborado de la katolikaro tutmonda sur ĉiuj agadkampoj de la kulturo nur sukcesos estante en plena kunsento kun la sankta eklezio kaj en perfekta obeemo je ties aŭtoritato, precipe la anstataŭanto de Kristo:

1. promesas absolutan fidelecon al la sankta eklezio kaj obeemon al la apostola seĝo, kies sanktajn interesojn multofte proklamitajn ili volas realigi per ĉiuj fortoj;

2. salutas tutkore la ĝisnunajn klopodojn de Internacio Katolika por la realigo de vere agadema internacia helporganizo katolika, laŭdante, ke Ika ĝis nun en nacipolitikaj aferoj restis tute sendependa, nur rekonante kaj aplikante la principojn de vere katolika politiko;

3. deziras la daŭrigon de la klopodoj de Ika

*a)* por la edukado al vere kristana kaj katolika spirito de komuneco familia de l' katolikaro;

*b)* por la laŭplana internacia organizo de la katolikaj fortoj tutmondaj bazata sur la kreitaj aŭ kreotaj naciaj organizaĵoj katolikaj kaj realigota laŭ la bezonoj de la moderna tempo, subtenante la nacian unuigon de la katolikaj fortoj diverslandaj, preparante laŭbezone la starigon de internaciaj fakaj aŭ profesiaj organizaĵoj, ekzemple de laborunuiĝo de katolikaj parlamentanoj, laboristoj, komercistoj ktp.;

*c)* por la kreo de efikaj institucioj katolikaj internaciaj precipe de internacia oficejo katolika peronta la internacian interkompreniĝon, organizonta internacian informservon ktp.;

de internacia katolika libroeldonejo por disvastigo de la ĉefaj verkoj katolikaj ĉiulandaj;

de internacia gazeto katolika por la tutmondaj interesoj katolikaj;

*d)* por la starigo de internacia katolika helpa kaj informa servoj pere de delegitoj destinotaj en ĉiuj urboj;

4. invitas fratmaniere ĉiujn individuajn katolikojn kaj ĉiujn katolikajn organizaĵojn kaj ĉiujn samtendencajn movadojn, kunlabori fervore kun Ika, evitante ĉian ĵaluzon aŭ egoismon ĉu politikan ĉu personan, por realigi per komunaj fortoj la kiel eble plej efikan helporganizacion internacian por la apogo de la sankta eklezio kaj ties laboro, por la perfekta realigo de la regno de Kristo en la mondo.

## La ĝenerala kunveno de Ika.

Sekvis tuj la ĝenerala kunveno de Ika. Ĉefsekretario Dro Metzger unue raportis detale pri la laboroj, sukcesoj kaj malhelpaĵoj dum la unua jaro. Kiam oni fondis Ika en Hago, aŭgusto 1920, la internacia situacio politika ne estis bona. Du vojoj por krei internacion katolikan ekzistis de la komenco; la unua: oni serĉas kunligi la jam ekzistantajn naciajn organizojn katolikajn en internacia ligo de la katolikaj organizoj. Tiu ĉi vojo estas ŝajne la plej simpla kaj mallonga. Tamen la sperto montris, ke li ne **tuj** estas irebla; ĉar la situacio internacia ne estas favora jam nun al tiela interligo. Tial Ika sercis iri alian vojon. Certe la **celo** estas la laŭplana kunligo de la naciaj organizoj katolikaj de la tuta mondo al vere agadkapabla laborunuiĝo. Por alveni al ĉi tiu celo ni unue penadis kunligi la jam ekzistantajn internaciistojn katolikajn en la tuta mondo kreonte tiamaniere vere vivanton, se ankaŭ komence tre malgrandan, Internacion katolikan. Tiel ni havis tre taŭgan lacororganizon kaj nun, paŝo post paŝo, interesigante kaj informante la naciajn organizojn, ni klopodas gaj ni ilin. Laŭ tiu ĉi metodo Ika laboris sukcesplene dum la unua jaro. Per organizata propagando — multaj mil da leteroj por varbi kaj klarigi estas dissenditaj en la tutan mondon, same eble 15.000 flugfolioj eldonitaj en la kvin ĉefaj eŭropaj lingvoj; al la katolikaj gazetoj de ĉiuj partoj de la mondo oni sendis informojn ktp. — oni povis interesigi multajn individuajn personojn influhavajn kaj ankaŭ multajn organizojn katolikajn, el kiuj aliĝis jam kelkaj ekz. en Svisujo, Belgujo, Litovujo, Germanujo, Italujo, Anglujo ktp. Plue ni klopodis starigi la internacian delegitan sistemon kaj sukcesis trovi delegitojn en ĉiuj partoj de la mondo ĝis nun. La tuta episkoparo de la tero estas informita per cirkuleroj latin — kaj nacilingvaj. Ankaŭ la perfektivigo de la Centra Administra Oficejo postulis multe da laboro. Precipe oni devas mencii la multegajn laborojn kaŭzitajn per la preparo de la internaciaj konferencoj.

Sekvis mallonga raporto pri la financa situacio de Ika. Kiam la laboro komencis en Septembro 1920, Ika havis nenion. Nur per la oferema kunhelpo de Blanka Kruco, enlanda misia societo, kiu pretigis la necesan monon kaj la gekunlaborantojn profesiajn, estis eble energie kaj laŭplane komenci la taskon. La elspezoj por la necesa materialo, la poŝtkontoj, la salajroj, la pligrandigo de la Centra Oficejo, la preparo de la konferencoj, kompreneble estis grandegaj. Malgraŭ la plej diligenta ŝparemo oni elspezis ĝis la 1a de aŭgusto 1921 proksimuno 450.000 kr. aŭstr. Se ankaŭ kelkaj amikoj tre fervore subtenis nian laboron finance, ni tamen devas konstati, ke la kunhelpo de la samideanaro ne ĉiam estis sufiĉe granda. Por la daŭrigo kaj pligrandigo de Ika pli ampleksa financa kunhelpo estas necesega.

Post la interesaj raportoj kaj la esprimo de kora danko al la Centra Oficejo kaj ties labor oficistoj oni pritraktis la diversajn proponojn.

Unuanime estas akceptita la propono de pastro Ĉe, Rumanujo nome de l' episkopo grafo Majlath, ke Ika prizorgu la starigon de socia komitato internacia por studi la internaciajn problemojn sociajn de l' moderna tempo; plue la propono de Sro Profesoro Gaspar, Nederlando, ke Ika prenu la iniciaton krei internacian komitaton, kiu studadu la plej praktikajn vojojn por servi al la tutmondaj katolikaj interesoj per politika kunlaborado internacia.

Unuvoĉe oni akceptis la proponon de l' C. A. O., elekti „Katolika Mondo", eldonitan de la nove kreita internacia „Paŭluseldonejo" kiel oficialan organon de Ika per starigo de kontrakto inter Ika kaj Paŭluseldonejo.

Plue oni komisiis la Ika-estraron post detala informo elekti la plej kunvenan urbon por la sekvonta kongreso.

Fine oni elektis la prezidantaron kaj direktoraron de Ika. La prezidantaro konsistas por la sekvonta jaro el 5 membroj; 3 egalrajtaj prezidantoj: R. P. Philippe, direktoro de la Ligo Apostola, Bruselo, Prel. Dro A. Gießwein, Budapest, Profesoro W. Arnold, Svisujo; plue kiel reprezentanto de prezidantoj en la C. A. O., la direktoro de la Centra Oficejo Dro M. J. Metzger, Graz; kiel ĉefsekretario: pastro Ĉe, Rumanujo; ĝis kiam li persone povos veni en la Centran Oficejon Sro Kasparo Mayr, Graz, provizore plenumos la oficon de ĉefsekretario.

Kiel naciaj direktoroj estas elektiktaj:

1. Anglujo: Rev. Prof. Dro J. P. Arendzen, London NW 6, The Mission House, Brondesburg-Park.
2. Aŭstrujo: Pro Koller, Göttweig, Malsupra Aŭstrujo.
3. Algerujo: Direktoro Couffinghal, Algier.
4. Belgujo: A. Neybergh, Bruselo, Jette-Bruxelles, avenue de Jette 151.
5. Bulgarujo: J. Varĉo, Kaŝlite, gub. Grabovo.
6. Brasilujo: C. Fernandez, Rio de Janeiro, 225 Lanrangeiras.
7. Brita okcidenta Hindujo: Pro W. Broens, Kingstown, St.-Vincent-Insulo, Catholik presbitery.
8. Ĉehoslovakujo: N. Balak, Husovice ap. Brno, Komenskeho 17.
9. Danzig: redaktoro Kietbratovski, Danzig.
10. Danujo: F. Krejl, Kopenhagen, Halmtorvet 40.
11. Francujo: Prof. Muffang, 14bis avenue Galois, Bourg-la-Reine (Seine).
12. Germanujo: E. Klein, Essen, Aldegreverstraße 13.
13. Hindujo: Pro Staniforth, Simla, Ripon Place.
14. Hungarujo: Pro Rafaelo Bartal, Magyarnándor, Nógrád megye.
15. Hispanujo: Prof. Mojado, Madrid, Abascal 13, Pral A.
16. Italujo: Prof. Carolfi, Cortemaggiore, Piacenza.
17. Irlando: Rev. Parker, Cushenstown Co. Wexford, Ballynabola.
18. Jugoslavujo: Pro Benkovic, Zagreb, 1 poste restante.

**Al ĉiuj!**

**Niaj kunlaborantoj** skribu kiel eble plej legeble, precipe nomojn, ĉar la kompostistoj, ne lertaj Esperantistoj, ĝenerale ne bone legas Esperanto-tekstojn, kaj des pli malfacile, se ili estas skribitaj en fremdlanda skribmanieroj se al tio ankoraŭ venas malekzakta skribmaniero, multaj artikoloj ne povas esti presataj.

**Varbu por Katolika Mondo!**

Propagand- aŭ provnumeroj en dezirata nombro senpage!

**Ĉiu propagandnumero unu nova abonanto**

estu via devizo!

19. Litovujo: Prel. Dombrauskas, Kaunas, Gr. Vilnastraße 34.
20. Nederlando: P. Heilker, Hoofdorp.
21. Palestino: Pro E. Schmitz, Haifa, St. Charles.
22. Polujo: Pro Szurek, Wola Rafatowska, ap. Albigowa, Metapolska.
23. Rumanujo: Pro Vorbuchner, Brasov, Klostergasse 23.
24. Rusujo: Pro Kolobiškin, selo Lomigori, poŝto: Volovo-Livenskoje, gub. Orlovskoj.
25. Saar-teritorio: Prof. Nassenstein, Voelklingen.
26. Skotlando: I. Tonner, Rutherglen, 32 Jedburghavenue.
27. Svisujo: Prof. W. Arnold, Zug.
28. Suda Afriko: P. Marravee, Banalya, Belga Kongo.
29. Usono: A. Vidikovsky, 2833 Livingstonestr., Philadelphia.
30. Latvio: Pro Sigizmundo Pipinus, Antonopole.
31. Aŭstralujo: Fino Helm Maud, Melbourne.

Fine Prel. Gießwein fermis la vere belegan konferencon, dirante ke estas la plej granda signifo de la konferencoj, ke malgraŭ la nuna politika situacio internacia multe da reprezentantoj el la plej diversaj ŝtatoj estis kunvenintaj por unuanime servi al la regno de Dio, de justeco kaj karito sur la terrondo.

## Porpaca konferenco.

Vere grandan intereson trovis ĝenerale la porpaca konferenco, okazanta la 12an de Aŭgusto sub la prezido de Sro P. Heilker, kaj Sro W. Arnold. Malfeliĉe Marc Sangnier, deputato de Paris, kiu ĝoje estis promesinta, fari la unuan raporton pri la interesega temo „Lia Papa Moŝto kaj la organizo de la paco", ne povis persone ĉeesti kaj ankaŭ la de lia ĉefsekretario Sro G. Hoog sendita raporto alvenis nur dum la lastaj horoj de la konferencoj. Tamen ni publikigas la raporton en K. M.

Entuziasme salutata de la tuta ĉeestantaro la famkonata pioniro de la Krista interpopola repacigo, prelato Dro A. Gießwein, deputato de Budapest, raportis en fajra parolado pri la nepra neceseco kaj granda tasko de internacia katolika porpaca movado. Kun ĝenerala aplaŭdo estis akceptata unanime la propono publikigi laŭeble ĉie en la mondo la bonajn ideojn de nia nuna prezidanto, precipe pere de K. M. Niaj legantoj trovos la belegan raporton en sekvonta numero. Paroladis poste Sro K. Mayr, Graz, pri la organiza formo de internacia porpaca movado katolika. La ĉefa tasko de la porpaca movado estas, laŭeble forigi la intermilitadon inter la kulturaj ŝtatoj. Jen la du ĉefaj kialoj de la modernaj militoj: unue la senfinaj personaj kaj naciaj egoismoj t. e. la kapitalismo kaj la troa nacionalismo; due la interŝtata anarĥio t. e. la senleĝa formo de la kunvivado inter la modernaj ŝtatoj. Tial regas en la mondo la bruta politiko perforta kaj nenie la krista justeco kaj karito. Do du ĉefaj taskoj estas: la eduka tasko, eduki la individuajn personojn kaj tiamaniere la naciojn al senegoista justeco je ĉiuj homoj, plue informi la popolojn pri la vereco. Tial necesas internacia informoficejo por interŝanĝi en frata kaj paca maniero la opiniojn pri politikaj aŭ ekonomiaj diferencoj, por informi laŭvere la katolikan gazetaron.

La dua tasko estas la energia agado. La katolikoj devas per organizita laboro kunhelpi por krei vere internacian juron de la popoloj kaj ŝtatordon en daŭra kaj laŭjusteca interligiĝo de kulturaj statoj.

Sed nur internacie organizata laboro havas sukceson. Tial oni devas efektivigi la jam antaŭ kaj dum la milito sukcese komencitan internacian ligon de la katolikaj pacemuloj. En ĉiu ŝtato formiĝu naciaj komitatoj kaj poste organizaĵoj, kie ili ne jam ekzistas, por la porpaca laboro katolika, kaj ili unuigu sin al internacia ligo por subteni la internacian sekretariejon, krei la necesegan informoficejon ktp. Kompreneble la diversspecaj naciaj movadoj restu tute memstaraj por siaj internaj kaj naciaj agadoj.

En la vigla diskutado oni unuanime akceptis la proponon de Sro Dro Carolfi, Italujo, elekti la Sanktan Franciskon de Assisi, la sanktulon de la katolika frata spirito, kiel patronon de la internacia katolika repaciga laboro. Plue trovis ĝeneralan aplaŭdon la propono de prelato Gießwein, konstrui pacpreĝejon je la memoro de la mortintoj pro la milito tutmonda, kiu estas tre taŭga ilo por servi al la paca ideo.

Fine oni entuziasme aplaŭdis la proponon de Sro Mayr, propagandITan jam de longe de francaj pacamikoj, ke oni petu en konvena maniero la Sanktan Apostolan Seĝon, ke eble oni enkonduku propran pacfeston en la tuta eklezio, kiam samtempe en ĉiuj preĝejoj katolikaj de la mondo oni prediku la religian fundamenton de la repaciga ideo kaj oni proponu kiel eble konvenan tagon la feston de la mortintoj.

Por tuj komenci la praktikan laboron oni elektis internacian komitaton, en kiu estas reprezentantoj el la diversaj ŝtatoj. Ili estas ŝarĝitaj prepari la movadon en siaj hejmlandoj. El la mezo de ĉi tiu komitato oni destinis trimembran agadkomitaton, sub la prezido de prelato A. Gießwein, kiu estas ŝarĝita prepari la internacian kunagadon kaj proponi la statuton al la internacia komitato.

## Mondlingva konferenco.

La por la konferenco destinita prezidanto Prof. Alessio (Italujo) malfermas la kunsidon kaj klarigas en mallonga parolado la grandan necesecon de komuna lingvo por la tutmonda katolikaro. En la momento, kiam ni katolikoj sur la tuta mondo posedas komunan lingvon, ni estas la plej granda potenco. Poste pastro Prof. Carolfi (Italujo) parolis pri la signifo de komuna lingvo por la internaciaj taskoj de la katolikoj. Aliĝe al tiu referato gimn. instr. Mielert el Breslau parolis pri la praktika uzado de Esperanto por la katolikaj interesoj. Ambaŭ referatoj estis multe aplaŭdataj. En la sekvanta diskutado, kiun partoprenis Sroj Schendeler, Heilker (Hollando), Dro Metzger, Graz, Dro Hinsenkamp, Essen, Pastro Baumeister, Karlsruhe, Prof. Knopf, Beuthen, precipe estis esprimitaj jenaj pensoj: Esperanto ne povas esti la celo de la internacia katolika movado, sed nur rimedo por katolikaj interesoj. La pli frua IKUE — tion akcentis precipe la vere klarega kaj impresiga parolado de Sro Heilker — de la komenco havis tute la saman penson. Ĝi alcelis laŭ la statuto, servi la tutmondajn interesojn katolikajn, uzante kaj propagante Esperanton kiel necesegan ilon. Tamen IKUE kompreneble en la komenco ne sufiĉe klare ekkonis kaj realigis ĉiujn sekvojn de sia ĝenerala celo. Do ĝi ne plu sufiĉis por la hodiaŭa tempo. Pro tio estis nepre necese, krei potencan universalan ĉion ampleksantan organizaĵon kiel nia „Internacio Katolika" (Ika). Ika do estas vera laŭrajta sekvanto de la antaŭa IKUE. Ĉar por Ika kompreneble la plej granda kaj rapida disvastiĝo de Esperanto inter la katolikaro estas plej grava, estas dezirinde, ke ekzistu specialaj laborgrupoj (naciaj kaj internacia) en Ika, speciale por propagandi Esperanton. Pro tio, precipe realigante la deziresprimon de la Itala kongreso de Bologna oktobro 1920, Ika kreis en la printempo 1921 per la interkonsento de la diversnaciaj katolikaj Esperanto-societoj la ligon de la naciaj katolikaj Esperanto-societoj, kiu alprenis la nomon de la antaŭa IKUE kaj elektis prezidantaron, konsistantan el Sroj Heilker, Mielert kaj Sappl. Tiu ĉi nova IKUE devas esti aprobata de la nuna internacia kunveno. Estis proponitaj du resolucioj, unu de Sro Schendeler, la alia de Dro Metzger. Tiu de Dro Metzger fine estis akceptata unuanime. Jen la teksto:

„La partoprenantoj de la konferenco por la mondlingvo, salutante Ika kiel internacian organizon por la katolikaj interesoj, konsentas, ke kiel faka organizaĵo poresperanta en Ika nova ligo de la naciaj Esperanto-organizaĵoj, IKUE, estas starigita kaj rekonas ĝin, dezirante, ke ĝi agadu sukcese por la disvastigo de Esperanto inter la katolikaro por helpi la ‚Internacion Katolikan'".

**Ĉu vi volas ?**

ke la grandioza plano de vere internacia organo por la katolikaj interesoj ne estu realigata? Ne? Do kunhelpu! Varbu abonantojn! Partoprenu finance ĉe l'eldonejo! Kunlaboru per verkado de artikoloj, sciigoj ktp. De vi dependas la estonto de K. M.

## Ĝenerala kunveno de IKUE.

Tuj post tiu ĝenerala konferenco komencis la ĝenerala kunsido de IKUE. Prezidanto Mielert malfermis kaj proponas kiel sekretarion de la kunsido Sron Sappl. Post kelkaj klarigoj oni pritraktis la nunajn statutojn de IKUE por eble fari kelkajn ŝanĝojn. La unuaj kvar paragrafoj estis akceptataj escepte kelkaj malgravaj ŝanĝoj. Pro la malmulta tempo la kunveno konsentis, ke la estraro ellaboru la aliajn paragrafojn, por poste ĝin prezenti al la naciaj prezidantoj. Kiel oficialan organon de IKUE oni elektis laŭ propono, enirinta kun 50 subskriboj, la oficialan organon de Ika „Katolika Mondo" eldonita en Graz. Fine oni elektis la estraron de IKUE. Prezidanto: Sro P. Heilker, Hoofddorp, Hollando; Vicprezidanto: Sro M. Mielert, Breslau, Germanujo; Ĉefsekretario kaj afergvidanto: Sro H. Sappl, Graz, Aŭstrujo. Ĉiuj elektitaj akceptis, do restis la antaŭa estraro.

Prezidanto Mielert fermis la kunsidon, esprimante la deziron, ke sub la nova estraro IKUE certe floros kaj kreskos.

## Raporto pri la kongreso de „Mondjunularo Katolika" (Moka).

Sub la prezido de Prof. Muffang (Parizo) kaj pastro Benkovič (Jugoslavujo) komencis la unua pritraktado de la internacia katolika junula movado. Post la salutoj de reprezentantoj de diversaj landoj kaj laŭtlegado de multnombraj salutleteroj kaj telegramoj i. a. de la episkopo grafo Majlath (Transsilvanio) kiu kaŭzis viglan entuziasmon, la afergvidanto de Moka por Svisujo Prof. Arnold (Zug) montris la grandajn celojn kaj taskojn de la internacia katolika junula movado. Li precipe atentigis, ke flama amo kaj entuziasmo por la idealo devas esti la konstruaj ŝtonoj de nia movado. Niaj celoj kaj nia programo estas pli grandioza, ol iaj aliaj. Ni nur devas ĝustamaniere ĝin montri al la junularo. Tiam nia entuziasmo denove ekflamos kaj la ventego de la ĝojo formiĝos super la disŝiritaj popoloj kaj alportos novan printempon, la sopiro de ni ĉiuj. Poste la ĉefsekretario de Moka Sro Sappl, Graz, klarigis la praktikajn taskojn de nia movado. Estas necese antaŭ ĉio krei praktikajn instituciojn, por ke la katolika junularo ĉiulanda reciproke povas interrilatiĝi. Moka en tiu rilato jam antaŭlaboris per kreo de la internacia leterŝanĝado, konstruo de la delegita sistemo ktp. Kiel proksimaj taskoj Moka planas la eldonon de internacia katolika junula organo, kiu povus eventuale servi kiel aldono al la naciaj katolikaj junulaj gazetoj. Post la referatoj sekvis vigla diskutado, kiu liveris multajn valorajn instigojn.

**Kiu scias adresojn**

de katolikaj **internaciistoj** aŭ **Esperantistoj** precipe en Usono, Kanado, Suda Ameriko, Afriko, Hindujo, Ĥinujo, Aŭstralujo? Oni sendi ilin **tuj** al la **CAO, Graz, Karmeliterplatz 5.**

La alian tagon estis la ĝenerala kunveno, kiun malfermis la prezidanto de Moka Dro M. J. Metzger, Graz. Post laŭtlegado de la intertempe ankoraŭ alvenintaj salutleteroj, ĉefsekretario Sappl donis la raporton pri la afergvidado. Li precipe akcentis, ke Moka malgraŭ la mallonga agado jam atingis sufiĉe gravajn progresojn. En pli ol 15 landoj ekzistas 100 delegitoj, kiuj fervore laboras kaj ĉiamaniere subtenas la centrejon en Graz. La leterŝanĝado pli kaj pli altiris la atenton de la tutmonda katolika junularo. Multaj organizaĵoj jam aliĝis al Moka. La financa raporto montris, ke Moka sen subteno de Ika ne estis povinta sukcese labori. Por la nova jaro estas planata budĝeto de 100.000 aŭstr. kronoj. Estis farataj du proponoj.

1. (Katolika junula grupo en Hispanujo.) La prezido de Moka konsistu estonte el du partoj, unue el direktanta komitato, kies membroj laŭeble loĝu en la sama loko, due el komitato internacia.

2. (Katolika Internacio.) Moka decidu en sia ĝenerala kunveno, ke ĝi estu la junula organizaĵo parta de Ika, sed kiel ĝis nun tute memstara. Plue Moka decidu, ke „Katolika Mondo", la organo de Ika estu samtempe la organo de Moka. Ambaŭ proponoj estis akceptataj.

Ĉefsekretario Sappl raportis poste pri la intencita fondo de unuiĝo de ĉiuj katolikaj junulaj asocioj de la mondo dum septembro en Romo. Oni akceptis unuanime resolucion salutante la instigon de Romo, fondi internacian ligon de katolikaj junulaj asocioj, kaj esprimis la sinceran volon kunlabori por ebligi unuecan kaj potencan internacian katolikan junulan movadon. Kiel reprezentanto de Moka ĉe la pritraktadoj en Romo estis destinata Sro Sappl, kiu intertempe jam partoprenis la kunsidojn en Romo. La venonta numero de Katolika Mondo enhavos pri tio detalan raporton.

Finfine oni elektis la novan estaron, kiu havis jenan resultaton:

Protektoro: Lia episkopa moŝto Grafo Gustavo Karlo Majlath de Transsilvanio;

honora prezidanto lia prelato moŝto Dro Alexander Gießwein, Budapesto;

prezidanto: Prof. W. Arnold, Zug (Svisujo);

ĉefsekretario: Hans Sappl, Graz.

Al la komitato apartenas kiel reprezentanto de Ika Dro M. J. Metzger, Graz, kiu estas samtempe anstataŭanto de l' prezidanto en la centrejo, kiel landaj delegitoj:

Prof. Geurden, Beeringen (Belgujo),
René Bürg, Bourg-la-Reine (Francujo),
stud. rer. pol. Weiß, Breslau (Germanujo),
stud. teol. Albanell, Barcelona (Hispanujo),
stud. med. Kemme, Amsterdam (Hollando).

Al la direktanta komitato de Moka oni donis la rajton laŭbezone pligrandigi la komitaton per elekto de novaj komitatanoj.

Prof. Arnold fermis la bele sukcesintan unuan kongreson de Moka, esperante kaj esprimante la deziron, ke nun ĉiuj Mokaanoj kun duobla fervoro ankaŭ pluen kunlaboru por atingi nian belan celon.

## La misia konferenco.

La plej impona fakkonferenco estis sendube la misia konferenco, kie oni pritraktis en tute nova maniero la plej urĝan taskon de la moderna tempo: la renoviga laboro katolika por regajni la homojn de la kulturaj ŝtatoj por Kristo kaj la sankta eklezio. La aranĝo, okazanta sabate la 13an de Aŭgusto, komencis per la eminenta raporto de R. P. Philippe, direktoro de la internacia „Ligue Apostolique" (Ligo Apostola), Bruselo, pri la „Revenigo de la popoloj al Dio kaj al la sankta eklezio". Jen la ĉefaj ideo de la belega raporto.

La terura milito, la sinarmigoj senfinaj, tuta la mizero nuntempa postulas la pacon universalan kaj organizatan. Kiel en ordigita ŝtato ekzistas laŭleĝaj juĝejoj por la disputoj ktp., tiel internacia leĝo kaj tribunalo estas necesaj. La eklezio ja ĉiam kondamnis la duelojn; fakte do la eklezio principe malaprobas la intermilitadon, kiu nur estas giganta duelo. La eklezio ne predikas la batalon por la ekzistado nek nomas la militon patron de ĉiuj aĵoj. Ĝia fundamenta principo estas la karita amo.

La vera renoviganto de l' paco estas Jesuo Kristo, la Dio de l' amo. Sur la natura frateco de ĉiuj homoj, kiun la nuna tempo forgesis tute, li ja fondis la supernaturan fratecon, la infanecon de Dio.

Same la apostoloj kaj la grandaj teologoj defendis la porpacan ideon nur permesante la justan militon defendan kontraŭ nekristanaj popoloj ĉiam akcentante la Kristan principon, ke oni pli bone devas suferi maljustaĵojn ol fari ilin. Sed en la klopodo

## Propagando-fondo.

La plej taŭga ilo por propagandi niajn ideojn en la tuta katolikaro estas la disvastigado de Katolika Mondo. Tial la eldonejo organizas laŭsisteman propagandon, dissendante senpage specimenajn ekzemplerojn al la plej diversaj adresoj. Do speciala propagando-fondo estas necesa por kovri la grandajn kostojn. Oni sendu mondonacojn per naciaj bankbiletoj al la PAŬLUS-ELDONEJO, Graz, Karmeliterplatz 5.

Listo de donacintoj: Pro Koller, Aŭstrujo, 1000 kr. aŭstr.; Leo Lutkie, Nederlando, fl. h. 2·50.

realigi la organizitan mondpacon la eklezio ne sukcesis ĝis nun; ĉar ĝi estis ofte malhelpita per nepacemaj registaroj, kion devas bedaŭri ĉiuj pacemaj katolikoj.

La porpaca movado, precipe la nekristana, ofte malsukcesas, ĉar oni nur serĉas novajn formulaĵojn sen trovi novajn animojn, novajn homojn. La paco estas trankvileco en la ordo; do la plej urĝa tasko krei la novan socian ordon, kio nur estas eble per la reveno de la individuaj personoj kaj de la popoloj al Kristo kaj eklezio. Jen la fundamenta principo de la nova mondordo: La Ligo de la nacioj, la unuopaj registaroj, unuvorte ĉiuj estraroj dependas de Dio, de kiu venas ĉiu potenco kaj ĉiu aŭtoritato.

„La Ligo Apostola", fondita 1916, sidejo Bruselo, klopodas realigi tiun ĉi celon, krei la novan mondordon, aplikante sur ĉiuj aferoj de la socia kunvivado la nomitan principon. Ĝiaj membroj realigas praktike tion per la preĝo, per la ofero kaj per la organizata apostola laboro.

Lia Papa Moŝto mem aprobis la nomitan ligon tre entuziasme kaj donis precipajn privilegiojn. Nur la celkonscia kunlaborado internacia de ĉiuj samtendencaj klopodoj povas realigi la grandan taskon. Do kunlaboru ĉiam la Ligo Apostola kaj la Internacio Katolika por la bonfaro de l'eklezio kaj de l'homaro.

Sekvis la parolado de D^ro Arendzen, Londono, veninta Grazon kiel reprezentanto de „Catholic Evidence Guild". La ĉeestantaro kortuŝite aŭdis la entuziasman, vere apostolan paroladon kaj per unuanima aplaŭdo decidis publikigi la bonegajn ideojn kaj proponojn de la oratoro por disvastigadi ilin en tuta la mondo. Niaj legantoj trovos la paroladon en nia gazeto.

Fine P^ro Baumeister, Germanujo, interesege raportis pri la ĝisnunaj sukcesoj de la laika helpovervo por la prizorgado de la animoj, precipe en Germanujo kaj Aŭstrujo. En grandaj trajtoj li klarigis la diversajn klopodojn por organizi sukcesplene la laikan helpservon en la moderna prizorgado de la animoj. Inter alie li skizis mallonge la societon „Blanka Kruco", organizaĵo por enlanda misio katolika (en kies sidejo estas la Centra Oficejo de Ika), kiu klopodas eduki siajn membrojn per religia sinperfektiĝo al „misiistoj" kaj per laŭsistema edukado de „laikaj helpistoj" servi al la pastraro kaj la katolikaj organizaĵoj.

## Politika konferenco. — Internacia informoficejo.

Dum la tuta daŭro de la konferencoj okazis diversaj malgrandaj kunvenoj kaj elparoladoj pri la plej diversaj problemoj. Plej interesa estis la politika kunsido, kie reprezentantoj el la diversaj ŝtatoj kune pritraktis diversajn demandojn, precipe kiamaniere oni plej bone povu realigi internacian kunlaboradon de la katolikoj sur la politika kampo por servi al la katolikaj interesoj tutmondaj. Unuanime oni salutis ĉiujn klopodojn, kiuj alcelas la fondon de internacia parlamenta unuiĝo katolika, ideo precipe propagandita de la katolika popolpartio itala. Plue oni interkonsentis, ke la kunlaborado de la katolikoj sur ĉi-tiu kampo, kvankam hodiaŭ malfacilega, estas absolute necesa. Precipe estas dezirinde, ke oni starigu internacian informoficejon, kiu havas du ĉeftaskojn; 1^e kolekti ĉiun necesan informmaterialon pri la plej diversaj fakoj de la katolika kultura kaj socia agado. 2^e Sendi informojn pri la katolika vivo ĉiuŝtata al la gazetaro katolika tutmonda per subteni la katolikajn interesojn. Tre praktika ekzemplo montras ĉi-tiun necesecon. Antaŭ kelkaj monatoj en Ĉeĥoslovakujo estis persekuto de la katolika eklezio; sed preskaŭ neniu en la mondo aŭdis pri ĝi. Ĉar la oficialaj gazetinformejoj preskaŭ senescepte estas en la mano de judoj, framasonoj ktp., kiuj kompreneble ne disvastigadas tiuspecajn noticojn. Se ni estus havintaj katolikan oficejon kaj se ĝi estus incitinta samtempe grandegan bruon en la tutmonda gazetaro katolika, certe la ĉeĥoslovaka registaro ne estus riskinta, daŭrigi la persekuton. Jes, se ni estus havintaj!...

Rekonante la urĝan necesecon de tiuspeca informoficejo, kiu devus esti pligrandigota iom post iom rilate al la diversaj fakoj de la katolika agado, la ĉeestantoj, rekonante la esperigan de Ika faritan komencon esprimis la deziron, ke la Ika-oficejo klopodu pligrandigi sian institucion kaj kreu tiamaniere en interkonsento kun samtendencaj penadoj internacian informoficejon. — Sendube tre bela, tre frukta, tre necesega tasko, tamen nur realigebla per kunhelpo de ĉiuj katolikaj movadoj kaj per sufiĉa financa subteno flanke de la katolikaro.

## Fino kaj komenco.

Je la fino de la interesegaj kaj fruktoplenaj pritraktadoj oni aranĝis sabate vespere komunan vespermanĝadon, kiu lastafoje kunvenigis la karajn gastojn diverslandajn al amuza elparolado. Dimanĉe okazis la belega ekskurso en la „Bärenschütz", kiu fakte estas unu el la plej belaj kluzoj de la Alpoj. Ĝojegoplene oni marŝis tra la silentaj montarbaroj, oni grimpis sur la senfinaj stupetaroj apude de la tondranta akvofalo — kaj oni preĝis en la malnova ligna preĝejeto sur la pinto de l' monto, dankante al la bonega Dio por la gracoplenaj tagoj pasintaj . . .

Se ni rigardas reen kaj pripensas la signifon de nia nunjara kunveno, ni eble povas konstati duoblan:

Ĝenerala signifo por la katolika agado internacia. Se ni preterlasas la lastjaran Hagan kongreson, kie oni nur povis pritrakti la fondon de Ika, niaj konferencoj fakte estis la unua pligranda kunveno internacia depost la milito, kie reprezentantoj el la plej diversaj ŝtatoj malgraŭ multegaj malhelpaĵoj estis kunvenintaj por servi al la praktika kunlaborado internacia.

Ne malpligranda estas la speciala signifo por nia Ika. Prave oni povas diri: en Hago Ika naskiĝis, en Graz ĝi faris la unuan paŝon, certe por la interna kaj ekstera evoluoj de Ika la konferencoj havos daŭran signifon grandegan. Ni nur mencias la solvon de la lingva problemo por la Ika-kongresoj, la detalan klarigon de la problemo de praktika helporganizacio internacia, la internacian katolikan gazeton, la planon ellaboratan pri internacia informoficejo, la rilatojn de Ika al la katolika politiko, la starigon de internacia porpaca komitato, la definitivan restarigon de IKUE., la kunmeton de komitatoj por sociaj kaj politikaj problemoj, la belegan misian, junulan konferencojn . . . sume dank' la la helpo de Dio la laboro kaj la sukceso estis grandaj.

Sed la fino de nia kunveno nur estas komenco por nova, plientuziasma, pli universala, pli energia laboro. Ankoraŭ ekzistas en la mondo grandega amaso da dubo, da antaŭjuĝo, da malkompreno, da malkuraĝo. Tuin-ĉi amason grandegan ni devas forigi per konstanta laboro celkonscia. Ni havu firman konfidon! Ni laboru! Dio kunhelpos! Ĉiam antaŭen kun Kristo ĝis la fina venko!

K. M.

## ? Kiamaniere mi povas subteni K. M. ?

1^e Mi varbas novajn abonantojn, almenaŭ unun.

2^e Mi tiuj anoncas min kiel kunlaboranton aŭ **raportanton** por la lando . . . . . . . . . teritorio . . . . . fako . . . . . . . . .

3^e Mi petas konatajn personojn katolikajn, ke ili skribu artikolon por K. M., se ili ne konas Esperanton, en la nacia lingvo, almenaŭ unun pojare.

4^e Mi rekomendas K. M. en mia katolika gazeto atentigante je gravaj artikoloj aŭ elĉerpante interesajn noticojn.

5^e Mi disdonas provekzemplerojn senpage liveritajn per la Paŭlus-eldonejo al miaj amikoj aŭ al katolikaj gvidantoj.

6^e Mi sendas adresojn de eble interesiĝantoj al la Paŭlus-eldonejo, Graz.

7^e Mi peradas anoncojn!

8^e Mi aĉetas akcion de 1000 aŭstr. kronoj por la internacia Paŭlus-eldonejo.

9^e Mi donacas monsumon por la subteno de l' eldonejo kaj disvastigo de K. M.

### Per agada kunlaborado!

## Internacia literaturo.

En ĉi-tiu fako ni mencias aŭ recenzas verkojn diversspecajn, precipe librojn, ĉiulingvajn, kiuj havas internacian signifon aŭ intereson por la katolika agado aŭ la internacia repaciĝo. La nura mencio ne estu juĝo pri la valoro de la koncerna skribaĵo. En la intereso de la katolika movado internacia ni petas, atentigi la naciajn eldonistojn publikigantajn tiuspecajn verkojn je ĉi-tiu internacia recenzejo.

Almanach Catholique français 1921 (Almanako katolika franca), Parizo, Bloud & Gay, Frs. 6·50.

Interesega jarlibro franclingva, eldonata de la katolika propaganda komitato, kiu enhavas ĉiujn sciindaĵojn pri la katolika vivo en Francujo, la episkoparo, la ĉefaj gvidantoj, la gazetaro, la societoj kaj religiaj organizoj kaj institucioj.

Œuvres catholiques de France (Katolika agado de Francujo), sama eldonejo.

Serio daŭrigota de broŝuretoj, eldonataj de la sama komitato, tre bone klarigas pri la nuna stato de la apartaj fakoj de l' agado katolika ekz. pri la junula movado, la ĝenerala agado ktp. Rekomendindaj por ĉiuj interesiĝantaj pri la nuna vivo katolika en Francujo.

## Diversaĵoj.

Festtago de la katolika gazetaro en Hispanujo okazas ĉiujare la 29^an de Junio, festo de la Sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo. Ĉi-tiu festo estas fondita en la jaro 1915 per iniciato de la direktoro de la centrejo por pastra agado „Ora et labora!" Tre grandaj estas la fruktoj de l' festo, kies devizo estas: preĝo, propagando, monkolekto. Ankoraŭ oni ne scias la sumon kolektitan en la tuta Hispanujo en tiu-ĉi jaro, sed jam estas certa, ke ĝi estas pli granda ol en la pasinta jaro, kiam oni kolektis 144.000 pesetojn. Ĉiu episkopo disdonas inter la katolikaj gazetoj de sia eparĥio la en ĝi kolektitan sumon escepte dek procentoj, kiujn oni donas al la Papo. La Sankta Apostola Seĝo tre favore subtenas ĉi-tiun agadmanieron kaj donis plenan indulgencon unue por Hispanujo kaj nun por la tutmonda katolikaro.

J. Giralt, Gerona, Hispanujo.

1600 jara jubileo de la ŝtata dimanĉoleĝo. La 7^a de Marto 321 p. Kr. la imperiestro Konstantio la Granda eldonis la unuan dimanĉoleĝon, per kiu la festado de tiu-ĉi festtago estas endukita en la mondhistorion. Komence tiu tago nur havis pure eklezian signifon. Kiel ĝenerala, de la ŝtata registaro ordonita festtago ĝi estiĝis de tempo, kiam la kristaneco sankciita estis ŝtata religio per Konstantino la Granda. La dimanĉoleĝo de la 7^a de Marto 321 tial signifas la komencon de la venkado de tiu-ĉi tago, kiu depost disvastiĝis tra la tuta mondo.

P. Kamillo, O. F. M., Linz, Aŭstrujo.

## Internacia poŝto.

Al ĉiuj. La multegaj laboroj antaŭ kaj dum la internaciaj konferencoj necesigis absolute kelkan tempon da ripozo por ni kaj niaj kunlaborantoj en la CAO. Tial la ioma prokrasto de la laboro kaj de l' apero de la 2^a numero de K. M. Nun la regula laboro energia estas rekomencita. Do senkulpigu la prokraston!

S^ro W. L. Nederlando. Certe ni konas la aliajn provojn por realigi Internacion Katolikan. Sed ne ektimiĝu! Mi ĝis nun ne povas kredi al la sukceso. Ĉar la ligo de la katolikaj organizoj ne estas tiel facile realigebla. Jes oni povas sur „verda tablo" krei internacian kunligon sur la papero. Sed laŭsperte la homoj al tio ne estas maturaj. Ekzemple oni kreis nun en Romo internacian kunligon de la katolikaj junulorganizoj, kiu ĝis nun nur estas kunligo de la naciaj centraj oficejoj. Do atendu ni!

Belega Esperanto-preĝlibro estas en preparo per la „Paŭluseldonejo". La germana teksto jam ekzistas. Ni serĉas vere lertan Esperantiston kaj teologon por la traduko.

## ? Kioma estas la abonprezo por K. M. ?

K. M. aperas en kolektoj po 10 numeroj. Jen la prezo por la unua kolekto, kies apero estas garantiia por la eldonejo: Anglujo, Hispanujo, Svisujo kaj samvalutaj ŝtatoj 4 ŝl., pes., fr. ktp., Nederlando kaj Brazilio 2 fl., 2 mrs., Usono 1 dol., Belgujo, Francujo kaj samvalutaj ŝtatoj 5 fr., Italujo, Jugoslavujo 6 l., d., Germanujo kaj Baltiko 10 g. mk., Litovujo, Ĉeĥoslovakujo, Rumanujo, Bulgarujo 10 kr. ĉ., lev. ktp. Aŭstrujo, Hungarujo 40 kr. aŭstr., hung., Polujo 80 mk.

**NB.** Oni sendu la monon plej bone per naciaj bankbiletoj de la propra lando al Paŭlus-eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo, aŭ al la nacia direktoro de Ika. Por Germanujo (Karlsruhe 26.195), Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Svisujo oni postulu poŝtpagilojn de l' eldonejo. Oni povas komenci la abonon per iu ajn numero.

**NB. Oni ne pagu per poŝtavizoj!**

## Anoncoj.

La prezo por anoncoj egalas po kvadratcentimetro la prezon de unu numero de K. M. en la nacia valuto de l' anoncanto. Por grandspacaj aŭ pli ofte presigotaj anoncoj rabato ĝis 40 %; plue por abonantoj de K. M. speciala rabato de 20 %.

### Anoncetoj.

La kostoj por unu foja enpresigo ĝis 25 vortoj egalas la prezon de 5 numeroj (duonkolekto) en la nacia valuto de l' anoncanto; por pliofta enpresigo rabato.

### Anocetoj por korespondado aŭ interŝanĝo.

La kostoj por unu foja enpresigo ĝis 15 vortoj egalas la prezon de 3 numeroj de K. M. en la nacia valuto de l' anoncanto; por pliofta enpresigo rabato.

### Por la Dante-jubileo!

La portreto de Dante pentrita en Firenze de Giotto di Bordone, samtempulo de la poeto, en kolora artpreso kun blanka papermarĝeno kaj subskribo, formato 35×55 cm, prezo 20 g. mk., kiel poŝtkarto 50 pf., por la Benedikta misio, ricevebla en la abatejo Schweicklberg, poŝtejo Oilshofen a. D., Germanujo.

La Paŭlus-Eldonejo, Graz,

rekomendas al ĉiuj ĝerm. Ikaanoj la bonege redaktitan monatan gazeton **„Neue Zeit"** estante la plej bona varbilo por Ika-ideoj kaj Esperanto inter neesperantistoj en Germanujo. — Prov- aŭ propagandnumeroj tute senpage!

!! IKA-INSIGNOJ !!

En emajlo faritaj.

Prezo po ekzemplero 1 fr. sv., 2 fr. fr., 3 lir., 4 din., 5 mk. g., 30 kr. aŭ. Por la aliaj similvalutaj ŝtatoj estas fiksitaj samvaloraj prezoj, pageblaj en nacia valuto.

Por pligrandnombra mendo grandegaj rabatoj precipe por ŝtatoj altvalutaj.

PAŬLUS-ELDONEJO, GRAZ.

Eldonejo: Paŭlus-eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5. — Redakcio: Dr. M. J. Metzger, Graz. — Presistejo: „Styria", Graz.

K. M. ne malpermesas la represiĝon de la artikoloj en la naciaj gazetoj. Kontraŭe ĝi deziras la disvastigon de siaj ideoj kaj per tio la servon al la katolikaj interesoj. Nur ĝi postulas la publikigon, ke la artikolo estas tradukita el K. M., la organo de Ika.